

PENSEO

N-ro 377

mar. / 2023

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 34-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

Tiberio Madonna (Italio)



Klorofilo

Klorofilo
sur la folioj
de miaj manoj
ovritaj
sub la sunradioj
de viaj okuloj
ardantaj.

Klorofilo
tra la haŭto
maldika
maldika vualeca
maldika vualeca pora
permeabla veleneca
penetrebla vualeca. Pora.

Klorofilo
eniras
fluas
cirkulas
en la vejnoj verdaj
tra l' arbar' malhela
de miaj membroj.

Klorofilo
inundas trairas
travojaĝas
mian korpon obskuran ombran
kaj lumigas ĝin
nutras skuas
energidona.

Klorofilo
reviviga fortoplana
verda lumo varma suko
amo brila
de l' kor' arbeka
naturverda
herbokolora. De vi.

Klorofilo
mirakla
miraklo spektakla.
El via kor'
la varmo supreniras
kaj viaj sunaj okuloj
projekcias la flugantan fajron.

Klorofilon
ili produktas
sur miaj manoj
foliformaj
sur la folioj manoformaj
kaj la rezult' estas tute
amo energio vivo nova, vivo
energio amo. Nova.

En mi.

Moissej Bronshteyn (Rusio)



Militoj la amon neniam abolas.
Per amo la homojn pacigas destino.
Jen tag' Valentena. Hodiaŭ mi volas
nur vortojn karesajn por vi, amatino,
retrovi en fundo de mia animo,
varmigi, beligi, ĝojigi per ili,

kaj eĉ se dividas nin la malproksimo,
enpense mi ĉiam ja vidas vin brili.

Do estu. Jes, estu. Kaj estu bonfarta.
Nun spite obstaklojn de l' mondo
dangera
ni kunos ja ĉiam en vivo aparta,
ni vidos nin ĉiam en songo leĝera.
Sed se ni kunvenos, – kaj ni ja
kunvenos
laŭeble pli ofte, en paco kaj sano, –
feliĉa brakum' ĉiufoje nin benos
kaj spirojn kunigos aerdiavano.

Soneto

Se vi hodiaŭ nostalgion ĉerpas
Eĉ el restinta ardo de l'agem',
Se revoj viaj fakte jam enĉerkas –
almenaŭ vi supozas tion mem.

Se via preskaŭ kvardekjara sperto
Neniom helpas pri l' situaci',
Se nova tago venas sen espero,
Samkiel teo sen suker' al vi,

Nek la venenon prenu, nek la kuglon –
Nur amatinon kaj la lastan rublon
Por ĉerpi saĝon el ŝatata vin'.

Preferu ridon vi al sinkompatato.
Ja estas ĉiu kruda sortobato –
Nur gaja prova ŝerco de l' destin'.

Plena luno transvitre al mi palpebrumas,
kuraĝigas min por stranga konversacio.
Svaga gasto en mia fotel' pigre fumas,
en rigardo lia brilas la ĉionscio.

Li ne havas hufojn, ankaŭ kornojn ne
havas,
en kostumo luksa li ja aspektas dande.
La pupiloj min boras, tio esence mavas,
kaj en la krepusko gapas mi lin demande.

Diras li, ke nun problemoj rutinaj miaj –
maljuniĝo, morboj, mon', meditat'
malhela –
forigeblas tuj, kiel aŭtunaj folioj,
se mi mem rifuzu tute, komplete de la

celoj kaj idear', preferataj dumvive,
nur animon mian mi donu al li por rego,
tiam mi vivos longe, sate kaj tre aktive,
kun estimo grava de l' tuta homa grego.

Mi eksentis la hufojn kaj kornojn surkape
de la vizitanto, eĉ se ŝike vestita,
mi respondis pli-malpli trankvile, eskape
el la ekreginta min kolero subita:

Via propono, sinjoro, estas kruela –
ja sen la animo mi certe nenion valoras.
Forbalaĝu do tuj, sinjoro, el mia fotelo
kaj ne malhelpu min. Mi laboras.


Ángel Arquillos (Hispanio)



Himeroj

Tragika fino,
tragika sorto,
tragika vivo.
Post longdaŭra promenado
atingis mi mian celon
kaj ĉe hela nokto-falo
mi prenis la rekompenccon
surgenue...
kun varmaj larmoj
gustumante ardan venenon,
kun la premi' en la manoj
ĉirkaŭata de tenebroj.
Tragika fino,
ĉar ne ekzistas paradizo
ankaŭ ne ekzistas infero,
nur mi kun mia mio
kaj nevalora premio
kaj la misteraj ĥimeroj.

Papos Nascentes (Brazilo)



Mevo

de partituro tradicia
 la solo-flugo de l' rompaĵo
 mergado vera malobeo kreaĵo
 ĝis la maltima fiŝo
 la mevo al la rot' revenas
 revene mirego ia sorĉo:
 vizio nova aŭdacas
 al leĝera vivo amika mano
 al donaco de facila grano
 libereco flugo aŭdaca eksido
 sur simbologio — amo migranta birdo.

Kiu mi estas?

Mi estas la mistero de la demando-respondo
 kiu en mi trem-brilas

Mi estas la mistero de la provizora respondo
 trem-brile per nova demando

Mi estas la mistero provizora de eterna
 Estulo
 dum ekzista trem-brilo

Mi estas la mistero de la trem-brilo
 provizora
 en la eterna maro de la emerĝanta
 nekonscienco de Si mem

Mi estas la mistero ne esti la persona mio
 estante tamen la mistero de la Tuteco:
 Si mem

Mi estas la mistero mem en Si mem.

Eratumo

mia facet' ia guto
 navigas sen kurso aŭ plan'
 sed kio estas plan' aŭ kurso?
 nemezurebla Ocean'?

kurso, plano - nur mezur'
 mondo tia pilgrim'
 fakte Ocean' estas Vivo:
 sen komenco nek fin'

estas nur falsa dilemo
 ĉiu gut' jen Ocean'
 laŭ Ocean': "sen problem'
 Mi estas la kurs' elfluanta"
 se Tio nomiĝas Esto
 ne estas por mi ĉagren'
 neniel Tio estu nomo
 ĉu I-Verbo por Eden'

Sovaĝeco

ĉar la poemo ne venis
 ĝiaj murdantaj komoj
 fosmaŝinaj ungoj
 dum tiu nokto de sufer'
 surhaŭte vejnon fosas
 de apokrifa limfo
 de oblikva muko

la tagvekiĝo ne venis
 sed intermikse promesas
 haŭton kie dolor' ŝprucas
 sendefenda skrap-vunda
 kaj precipe suferanta
 dum tiu nokto de sufer'
 sen brido aŭ bremsa

se sindisponi veni
 la distorda poemo
 al kiu mirega leganto
 servos ĉinokte de sufer'
 de limfo de muko
 eĉ de grasa sterk'?

povas la poem' ne veni
 aŭ tute ebria veni
 estante maldungita
 en nokto apokrifa
 de frenezega sufer'

Klaus Frieze (Germanio)



Hunda sopiro

Sur fenestrobreto sidas
 hundo, kun sopir' rigardas
 ĉiutage tra l' fenestro.
 Stranga estas tiu besto.
 Ne nur stranga,
 kurioza
 estas ankaŭ roza kato
 en aliaflanka strato.
 Kurioze
 kaj mistere
 ankaŭ sidas ĝi sur breto.
 Kio estas la magneto?
 Kato vere serioza,
 kurioza,
 grandioza,
 proza,
 roza.

Unu tagon sur la breto
 estis ŝanĝo de l' sekreto.
 Nia hundo ne plu gapis,
 de l' fenestro nun eskapis
 kun malĝojo
 kaj sen bojo
 ne plu mordis grasan oston
 kaj mallevis sian voston,
 ĉar la kato
 de la strato
 aliflanka ne plu estis
 sur la loko, kie restis
 potoj kun belegaj floroj
 por doloroj,
 kaj la ploroj,
 foroj,
 koroj.

Posedanto de la hundo.
 Li atendas ne ĝis lundo
 kaj demandas najbarinon,

kiu tenas la katinon.
 Kun kompreno
 la forpreno
 de la floroj sur fenestro
 estas helpo por la besto
 por rigardo
 nun kun tardo
 al la aliflanka hundo
 kiu nun eĉ je la lundo
 sidas sur fenestrobreto.
 Rigardeto.
 Silueto.
 Breto.
 Reto.

Pumbrika nuptonokto

En la teron rampas la tervermo
 kun volupto serĉas ĝi partneron.
 La testikoj ĉiuj kun spermo.
 Ĝi preparis zorge la aferon.

Spermon ankaŭ portas kunludanto.
 Ankaŭ ĝi nun rampas kun volupto.
 Ĝi ne estas stulta diletanto,
 ĉar sopire strebas ĝi al nupto.

Gefianĉoj en surtera lito.
 Ambaŭ estas baldaŭ tre proksimaj.
 Komenciĝas nun la nupta rito.
 Amorantoj estas tre intimaj.

La terverm' estas hermafrodito.
 Krom la spermo kreskas la ovoloj.
 Reciproka estas la profito
 por teneraj veraj karamboloj.

La partneroj dancas nun kun amo.
 Baldaŭ jam aperas la kokonoj.
 Nun la paro pretas por proklamo:
 Pensu ne, ke tiuj estas ŝtonoj!



Wally du Temple (Kanado)



Nova Vireto

1.

Mi, juna, provis imiti heroon, Tarzan
De komiksoj, arba akrobato
kaj arketipa sovaĝa infano
kreskigita en afrika ĝangalo
fare de la Mangani-simioj;
kiu poste travivas civilizon,
nur por malakcepti ĝin
kaj reveni al sovaĝejo
kiel heroa aventuristo

2.

Estis grandega cedro en najbara arbaro.
Ĝi havis grandegan cirkonferencon.
Dika branĉo etendiĝis de trunko.
Paralele al la grundo, forta brako.
Orte ĝi turniĝis supren al la suno.
Fiera brako kun granda fleksita bicepso.
Paĉjo mia pendigis ŝnurojn ambaŭflanke
de la vir-ŝvelaĵo.
Mi estis dekkvar jara kaj bankostume
imitas Tarzanon.
Mi pendis, svingis, grimpis forte kaj alte
provflugis.
Mi fleksis muskolojn, premegis ŝnurojn
kaj saltis brave,
Mi grimpe suprensvingis al arba kanopeo
Laca mi haltis kaj rigardis muskon kaj
sciurojn
Kaj rigardis supren al la verda
firmamento
Dum lumpikoj penetris branĉo-frondojn.
Tiam pli forta instigo pelis min
suprengrimpi svingŝnuron novcele
Nudaj piedoj pinĉas la kanabo-fibrojn.
De la supro nudbruste
mi vidis vulkanon, kies varmo
sendas fumon ĉielen.
supren mi grimpis ŝnuron—
elshire suben mi glitis ĝis

-inter-gamba ŝnurfrotado-
ekis interna sinosento
de alvenonta vireco
kaj mi spiralis laŭ ŝnuro
al erupcio de vireco
ĝis staranta nudpiede
okazis tertremo
en korpa histo kaj
per lafo-ajakulo
viret-vulkano
la mondon
ŝanĝis.

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Fenestro

En multe da domoj modernaj vi trovos ĝin—
pordeton kutime akompanantan la pordon.
Ĝia valoro ne estas pli alta ol la pordo
ĉar kelkfoje estas pordo sen fenestro.

Plurfoje via koro estas plena je hontemo
aŭ de timo, kiu vin regas kaj venkas.
Vi timegus rigardi eksteren tra la pordo,
sed la fenestro vin permesas rigardi.

Aliffoje via animo ne trovas sunbrilon,
malproksime de la bona lumo ilumina.
Fenestro do fariĝas vojo de lumo
por ke neniam velku animo via.

Pordo kaj fenestro, alinokte, similas
novgeedzojn—
kie estas pordo, tien malproksimiĝas
fenestro.

Sed kelkfoje troviĝas nur pordo laŭdata
ĉar fenestro estas nur akompananto, aŭ
helpanto.

Estas diro ke la fenestro estas vojo malbona,
kaj la pordo estas vojo vera, vojo bona.
Ĉiu, kiu jam eniras tra la pordo,
ne lasu la domon tra la fenestro.

Noemuti, Timoro, marte 2011

Paĝoj de rakontlibro

La tagoj pasas rapide samkiel la paĝoj
de fabellibro turnitaj rapide de leganto
esperante por si mem feliĉan finon
kvankam la intrigo estas malfacila, li scias.

Li malfermis la libron kiel blindulo.
La komenco fluas kiel rivera akvo
moviĝante al la oceano de ekstazo,
kiu fariĝas tio, kion li nomas agonio.

La libro estas ankoraŭ malfermita; li legas.
Dum li provas atingi la finan paĝon,
li trovas tie multe da malĝojo kaj ĝojo;
kaj li daŭre esperas feliĉan finon.

Ĉapitron post ĉapitro li nun pasis,
kaj ankoraŭ multaj pliaj ĉapitroj por tuŝi.
Kvankam la rakonto estas ankoraŭ longe
finita,
feliĉa fino estas ĉio, kion li volas ĝui.
Tradukita de la aŭtoro mem el sia angla
poemo

“Pages of a Story Book” (Yogyakarta, 2003);
Ungaran, Centra Javo, 6an de julio 2022

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Plenigu l'mondon per amo

Mi vizaĝon vian kare tenas,
kaj sekigas viajn larmojn tute.
Mia koro al vi apartenas,
estu ja ne plu soleca mute.

Mi rigardas fikse vin tenere,
pluan la parolon ne bezonas.
Premas viajn manojn mi sincere,
tiun ĉi varmecon mi tuj konas.

Eĉ se ni ne vidas reciproke,
eĉ se inter ni la interspaco;

Bondeziras al vi mi surloke,
ĉion bonan ĉiam kun la paco.

Ni aspiras same je la flamo:
ja plenigu l'mondon kun la amo!

Elĉinigitaj laŭ metriko de angla soneto

Voĉoj de printempo

Al ĉielo flugas la alaŭdo,
Freŝa vento milde ĉien blovas.
Dank' al dio miras ni kun laŭdo,
Primavera spiro ĉion kovas.

Kampoj verdas vigle kun espero,
Fido al savado nun revenas.
Malproksimos ĉiuj de sufero,
Kiso de Sunlumo nin jam benas.

Jen tenere kantas najtingalo,
Voĉoj de printempo tiel dolĉas.
Rojoj lirlas ame tra la valo,
Sopirado al bonfarto sorĉas.

Tristo malaperos el la mondo,
Al ni bene fluas la vivfonto.

Spiro de Printempo


Ho printempo estas jen veninta
Brizo freŝe lantas tra l' arbaro
Ĝus vekiĝas Tero ja mirinda
Mevoj ŝvebas vigle sur la maro.

Delikatas rozoj kaj violoj
Spiro de printempo bonodoras
Abelaro zumas inter floroj
Birdoj sur arbpintoj dolĉe ĥoras.

Nin salutas lumo primavera
Blankaj nuboj flirtas sur ĉielo
Verdas la kamparo tuj prospera
Sorĉas nin printempdiina belo.

Mondo nova helas kun aspiro
Homoj plenesperas per inspiro.

Jadranka Miric (Serbio)



Vi

Falanta neĝo kotoneca
ornamis nigran hararon vian.
Sur ĝi flirtis maŝo ruĝeca.
Tiu ĉi harmonias kun ruĝa lipŝminko via.

Rido sur vizaĝo via
pro interna kontentec'.
Okulbrilo stele trembletis via.
Mia koro forte batis pro vera amikec'.

Kiam vento ludas

Severa suna tago.
Aero odoras je neĝo.
Forta vent' fajfe
salutas salikejon ĉe lago.

Fojfoje vento
svingadas branĉon.
Alten flugis ruĝa balono
kun venta kaj infana konsento.

Gaje kriaĉas infanoj
Miksiĝas iliaj krioj
kun ventaj akraj manoj.
Ruĝiĝas iliaj vangoj.

Ŝtelante diverskolorajn balonojn
por ornami ĉielan ĝardenon,
vento kunportas ilin trans
tegmentojn
por surprizi alian nekonatulon.

Ivanichka Magharova (Bulgario)



Pluvo

Pluvo
frapas sur la fenestro
La infaneto
dormas kun rido

sur sia vizaĝo.
Songas ĝi
la kison de la patrino
Ŝi
laboras duan brigadon
kaj baldaŭ venos!
La patro
estas ie en la mondo
laborante pro la pano.
Pluvo
frapas sur la fenestro.
Mateniĝas.
La mateno
estas kovrita per
la purpurkoloro de la Dioj!
Sed en la ĉambro
daŭras la silento!
Pluvo
frapas sur la fenestro.
La tago
komencas denove.
La floroj velkas
soifaj por konsolo.
En la ĉambro
estas silento!
La vortoj mortas!
Pluvo
frapas sur la fenestro.
La pordoj grincas
forlasitaj sen amo.
La tago
mortas kruela kaj
Indiferenta.
La doloro restas!
Pluvo
frapas sur la fenestro!

Joachim Ringelnac

Mi tiel amas vin

Mi tiel amas vin!
Mi al vi, se vi ĝin bezonus,
eĉ kahelon el mia forno

donus.

Mi ne malicis al vi, hoj!
 Min kaptas sento de trist'.
 Ĉe l' deklivoj de l' fervoj'
 lumas abunde genist'.

Forpas' – bedaŭr'.
 Mi vin ne forgesas,
 vojaĝas.
 Ĉio kun longa daŭr'
 sentsaĝas.

La temp' sur l' voj'
 ĉiun fornegas.
 Jen eĉ boj',
 la hund' ne legas,
 skribanto ne estas.
 Pro dev' ni ne restas.

Mi ridas.
 Esencas je kribrilo truoj
 ĝis ties fin'.


Mi tiel amas vin.

tradukis



Hans-Georg Kaiser
 (Germanio)

SIGITAS GEDA, (1943 – 2008)



Mi portas branĉeton de rut'

En la lum' de l' ĉiel',
 En profundo de l' kor'
 Kreskis, elkreskis
 Branĉeto de rut'.
 Bele kreskintan
 Verdan, simile al kan',
 La branĉon mi portas
 Al vi, etulin'.
 Akceptu donacon

De plej ĉasta kor',
 La branĉon de l' ruto
 Kun verda flor'.
 El sub tiu ĉi floro
 Ĉiame rigardas mi
 En bluan lageton
 De via anim'.

Infanoj sub lilioj

Blankaj lilioj
 Sub fenestro tordiĝis
 Sub blankaj lilioj
 Infanetoj du staras.
 Unu infan' estas blanka,
 Alia infano, ho – verda.
 Rigardas al unu alia,
 Steletojn pridemandadas.
 Kiu semis terpomojn?
 Kiu semis liliojn?
 Kiu, do, semis la lagojn?
 Kiu semis hometojn?
 Kiu loĝas post montoj?
 Kiu loĝas ĉiele?
 Kiu loĝas sub tero?
 Kiu loĝas en steloj?
 Kien iros ni ĉi vespere?
 Kien morgaŭ ni iros?
 Kie ni estos,
 Kiam ni maljuniĝos?
 Kie post cento da jaroj
 Ni estos?

Ellitovigis



Antanas Vaitkevičius
 (Litovio)

El Ĉina Antikva Poezio

Xin Qiji (1140-1207)

DUMVOJE

—laŭ melodio *Luno super okcidenta rivero*
 Pigo surprize deflugis de branĉ' en lunlumo,

mi jen ekaŭdas cirpadon cikadan noktmeze.
Kampoj de rizo heroldas abundan rikolton,
ranoj kvakadas laŭdkante kompleze.

Sep aŭ ok steloj glimbrilas tra nuboj,
kelkaj pluvgutoj dancflirtas jen antaŭ la
monto.

Apud arbaro sin trovas malnova gastejo,
vidas mi tuj ĝin, laŭ l' vojo ĝis ponto.

Al falantaj floroj

—laŭ melodio *Papilio*

Hieraŭ la printempa mano,
kiel la knabino dektri-jara,
kiu eklernas brodi nelge,
elpentris florojn jen per tuŝ' avara
kun grasaj vangoj.
Sed senkompata pluv' letala
vipbatis florojn jen lastnokte,
la tero de ĝarden' kun ruĝo fala
verŝajnas la tapiŝo granda
jen kun plisaĵoj de skarlato pala.

Nun la printemp' ne restas
ĉi tie longe kiel la vaganto kun frivolo.
Lastjare post forlas' printempa
—mi tenas tion freŝe en memoro—
la tuta akvo de rivero jam fariĝis
aroma vino verda en koloro.
Hodiaŭ mi invitas trist-ĉagrenon
al bordo kun salikoj en nebulvaporko
por reteni l' printempon
sincere por momento plia per bonvolo.

Dediĉe al ĉefministro Ye

—laŭ melodio *Budhista dancisto*

La verdaj montoj emus ja konversacii
kun elegantuloj, svagaj en la foro.
Kaj ili ŝajnas kurĉevaloj
algalopantaj kun fervoro.
Sed ili hezitemas en nebula pluvo,
finfine ne alvenas jen laŭ mia volo.

Laŭdire haroj sur la kapo
blankiĝas certe pro ĉagreno.
Kunfrapas ambaŭ manojn
ridete mi kun mokmieno
pri sablomevoj, kiuj havas
tutkorpajn plumojn en plenpleno:
ĉu ili ja kunportas dum la vivo
ĉagrenojn sen ĉiama sveno?

—laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

Apud pad' en kampoj
morusarboj ŝosas juneverde,
kelkaj morusraŭpoj eloviĝis
kaj rampetas iome inerte.
Sur monteto herbkovrita
muĝas flav-bovidoj, lerte
jen svingante voston ĝoje.
Kelkaj korvoj flugas celocerte
al frosteta la arbaron en sunlumo
la vespera briloperde.

Verdaj montoj kunligiĝas
en proksimo kaj la foro.
Vojoj serpentumaj
jen interkruciĝas kiel floro.
Vinvendejo kun flirtanta flago
en vilaĝ' sin trovas en izolo.
En la urb' persikoj kaj prunarboj
tristas en ventpluv' de malfavoro.
Nur kapseloj kreskas ĉe la rojo
pompas bele en printempa gloro.

Spektado al pluvado

—laŭ melodio *Printempo en palaco*

La aŭtuna briz' la pavilonon
blovas jen karese kiel la lastjara,
kiu iam blov-invadis mian domon.
En okuloj miaj la pejzaĝ' reala
restas sama, sed la montojn kaj riverojn
regas jam la mano malmorala.
Sukcesintoj jam forpasis. Kiam
la aŭtuno venas jen kun frid' vuala,
homoj forfremdiĝas de la ventumiloj.
Kvankam blovas vent' aŭtuna kun

humoro gala,
la sunsubiranta ruĝo tamen restas sama.
La venĝemo por la land' fariĝis pala.

“Odo al aŭtuna vent’” far Liu Che*
ja cirkulas dum mil jaroj populare,
kun belegaj vortoj kaj ĝuiga stilo,
la poemo senkompara eksterordinare!
Sed nun sin prezentas aŭtunsceno
kun ĉagreno trista plenamare.
Jen amik' admonas al mi perletere:
Ne forgesu pri hejmloko memorpale,
nek pri legomkaĉ' kaj perka supo,
sed nur blinde agu rutinfare.
Ho ve! kiu nun imagus, ke mi legas
klasiklibron en lamplum' mensklare?

**Liu Che (156-87 a.K.) estis la sepa imperiestro de Okcidenta Han-dinastio, granda politikisto, strategiisto kaj poeto.*

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Liu Kezhuang (1187 -1269)

La navedaj orioleoj

Kun amo ili flugas de saliko al alia,
Trilante kiel sono de teksilo manmetia.
En Luoyang floroj brilas kiel brokato aprile*,
Ho, kiomlonge ili teksis ĝin tiel subtile!

Aprile: en la originala teksto la monato estas la tria laŭ la ĉina lunkalendaro, kaj tiam pompas printempo.*

La pejzaĝo en frua vintro

Mi vidas, vekiginte, tra fenestro matenruĝon,
La frosta vento trans bambuoj blovas
fortiĝante.
Servisto, mi ordonis, novan varmĉambron
aranĝas;
Malnovajn vintrovestojn knabo gladas
laŭkomande.

La vino estas jam fermentigita, kaj viando
De kraboj grasaj flavas kiel tranĉita oranĝo.
Ĝardenaj krizantemoj kaj hibiskoj
admirindas:
Ne preterlasi de nun ĝuon de l' naturoŝanĝo.

Xu Yuanjie (1196? - 1245)

Sur la lago

Sur arboj ruĝafloraj la orioleoj trilas,
Super herbej' kaj lago ardeoj pace giras.
Kun koro ĝojhumora, en krepusko serena,
La homoj, en flutsonoj, remante hejmeniras.

alia versio:

Inter ruĝaj plantaj floroj orioleoj ĥoras,
kaj ardeoj flugas super lag' herboza, milda.
Ĉe vesper' serena ekskursantoj gajhumoras,
plezurboatoj revenas en muziko flirta.

Dai Min (?-?)*

Frusomera vizito al la ĝardeno de Zhang

En laĝeto, ĉi tie kaj tie, naĝas anasidoj,
Maturiĝas umeoj en duonserena vetero.
De l' uesta ĝarden' al l' eosta oni ebriiĝas,
Pri l' eriototrioj orflavaj fieras prospero.

**La poeto vivis dum la periodo de Song-dinastio (960-1279).*

Sa Dula (ĉ. 1272 - 1355)

Vidaĵo en Shangjing

Bovoj kaj ŝafoj pace paŝtas sin ĉe sunsubiro,
aromas herboj kaj fromaĝo sur la vasta
stepo.

Abrupte alruliĝas sabla ŝtormo kirliĝanta,
faligi jurt-kurtenojn nun videblas ĉies strebo.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUTRIDEK-DUA

Liezi

§32-01

Kiam Liezi estis duonvoje al la regno Qi, li sin returnis kaj reiris al sia hejmo. Sur la revena vojo li renkontis Bohun Maoren, kiu lin demandis:

“Pro kio vi revenas?”

“Ĉar mi min sentas terurita,” respondis Liezi.

“Kio do faris vin terurita?” ree demandis Bohun Maoren.

“Ĉar mi manĝis supon ĉe dek supovendistoj, el kiuj kvin servis senpage al mi la unua,” respondis Liezi.

“Ili per tio ja montris al vi respekton. Kial do tio povus esti terura?” demandis Bohun Maoren.

“Mi konscias,” diris Liezi, “ke mia interna sincereco estas ankoraŭ ne perfekta. Mi brilas nur per la eksterajo. Mi konkeras la koron de homoj per eksteraj rimedoj, kaj el tio povos sekvi, ke oni respektos min pli ol la pliaĝulojn, kio sendube kondukos al katastrofo. La supovendistoj celas nur vendi sian supon. La profito, kiun ili faras, estas tre malmulta, kaj ilia intenco montri al mi respekton estis tute nerimarkinda. Ili tamen traktis eĉ min kiel gravulon, por ne paroli pri la princoj de grandaj regnoj. Ĉar la princoj dediĉas sian saĝecon al la regnaj aferoj, kiuj tre lacigas ilin, tial tre povas esti, ke ili konfidos al mi tiujn ŝarĝojn kaj postulos, ke mi faru efikajn atingojn. Jen kial mi estas terurita.”

“Viaj observoj kaj analizoj estas absolute ĝustaj,” diris Bohun Maoren. “Se vi plu tiel kondutos, homoj certe amase venos submetiĝi al vi.”

Post iom da tempo, kiam Bohun Maoren iris vidi Liezi, li rimarkis multajn ŝuojn antaŭ la pordo. Li haltis kaj staris kun la vizaĝo al la nordo dum kelka tempo, apogante la kapon sur la promenbastono, kaj poste li sin returnis kaj foriris,

sen diri eĉ unu vorton.

Kiam la pordisto raportis la alvenon de Bohun Maoren al Liezi, tiu tuj nudpiede eliris el la domo kun siaj ŝuoj en la manoj kaj diris:

“Kial vi, sinjoro, jam alveninte al mia domo, foriras sen lasi al mi eĉ unu vorton da konsilo?”

“Ba!” diris Bohun Maoren. “Mi antaŭe jam avertis vin, ke homoj certe amase venos submetiĝi al vi. Miaj vortoj nun pruvigas veraj. Per la vortoj mi ne volis diri, ke vi venigu ilin al vi, sed ke vi ne povas igi ilin ne veni al vi. Vi propre ne devus intence impresi homojn per viaj distingiĝoj disde aliaj. Certe vi estas interne movata de io vanta, kio skuas vian denaskan naturon, sed tiuj homoj, kiuj ofte vizitas vin, ne avertas nek atentigas vin pri tio. Iliaj komplimentaj paroloj estas por vi veneno. Ĉar neniu estas konscia pri tio, kiel do vi povus ekzameni unu la alian?”

“Tiu, kiuj havas lertajn manojn, lacigas sin fizike; tiuj, kiuj estas inteligentaj, lacigas sin mense. Nur tiuj, kiuj taŭgas por fari nenion, aspiras nenion. Kun sia stomako plena, ili vagadas sencele, same kiel drivas ŝipo sen kablo. Tiaj homoj estas veraj vagantoj en la malpleneco.”

§32-02

En la regno Zheng vivis iu homo nomata Huan, kiu studis kaj voĉe recitadis siajn lecionojn en la loko nomata Qiushi. Post tri jaroj li fariĝis fama konfuceisma klerulo, kies prestiĝo etendiĝis al sia tuta klano, kaj lia influo estis tiel profunda, kiel la riverakvo humidiganta la ambaŭbordojn. Rezulte de tio, li instigis sian pli junan fraton studi moison, kaj tiu fariĝis moisto. La konfuceismo kaj moismo estas du pensokoloj kontraŭaj inter si, kaj sekve disputoj estiĝis inter li kaj lia frato, kun ilia patro subtenanta lian fraton.

Huan, treege kolera kontraŭ sia patro, kiu staris sur la flanko de sia pli juna filo, sin memmortigis post dek jaroj. En sia sonĝo lia patro aŭdis, ke lia filo, Huan, diras: “Estas ja mi, kiu instigis vian filon fariĝi moisto. Kial vi neniam volas viziti mian tombon, kie la aŭtunaj cipresoj prosperas kaj jam fruktas?”

La Kreinto donas al homoj ne saĝecon, nek kapablon, sed ilian naturan dispozicion. La pli juna

frato fariĝis moisto, ĉar li posedis tiun ĉi naturan dispozicion. Huan, kiu rigardis sin supera al aliaj, malestimis eĉ sian patron. Li agis same kiel tiu homo el la regno Qi, kiu, fosinte puton, forpelis tiujn, kiuj venis por ĉerpi akvon. Niaj samtempuloj ĉiuj estas tiaj homoj, kia Huan estis. Tio jam fariĝis la komuna kutimo, kiun tamen ne aprobas la homoj, kiuj posedas la virton, por ne paroli pri tiuj, kiuj atingis la Taŭon. Sed en la antikveco la atribuo de alies meritoj al si estis rigardata kiel malobeo al la leĝoj de la naturo kaj sekve devis esti punata.

La saĝulo estas kontenta pri la natura stato; li ne volas la staton homfaritan. La ordinarulo kutimas al la stato homfarita; li ne volas la naturan staton.

Zhuangzi diris: “Estas facile koni la Taŭon, sed estas malfacile ne paroli pri ĝi. Tiu, kiu konas ĝin kaj ne parolas pri ĝi, estas sur la vojo al la ĉielo. Tiu, kiu konas ĝin kaj parolas pri ĝi, estas sur la vojo al la homoj. La antikvuloj iris al la ĉielo kaj ne al la homoj.”

Elĉinigi



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Mondpaco

— laŭ ĉinesko *Budhista dancisto**

Mirindas la naturo
kun brava aventuro.
Fluas verda roj’,
sinuas la voj’.

Sub bluĉielo,
al glora celo.
Vigle por mondpac’
laboru sen lac’!

**Budhista dancisto (ĉine: Pusaman): ĉina fiksfirma*

poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

Printempo

— laŭ ĉinesko *Belulino Yu**

Printempdiino belas,
sunlumo helas.
Brizo blovas tra l’ arbar’,
akvbirdoj ŝvebadas sur la mar’.

Brilflagras sur ĉielo
la verda stelo.
Klaraj ondoj fluas jen
tenere tra mia songĝ’ kun ben’.

**Belulino Yu (ĉine: Yumeiren) ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.*

Lanterna Festo

— laŭ ĉinesko *mallongigita melodio magnolia***

Jam serenas,
lanterna festo benas.
Ni festas nun
sub hela la plena lun’.

Flagras brile
lanternoj buntjubile.
Laŭ bonesper’
ĉi-jare regas prosper’.



**Lanterna Festo okazas en la mezo de la unua monato laŭ la luna kalendaro. Sub la plena lumo oni festas kun buntaj lanternoj kaj divenas enigmojn, kaj laŭkutime oni festenas manĝante pastobuletojn dolĉe farĉitajn (ĉine: yuanxiao, prononce: jŭansjajŭ).*

***Mallogigita melodio magnolia (ĉine: jianzi mulanhua) ĉina fiksforna poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.*

Jadranka Miric (Serbio)

Ankoraŭ vintras

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Noktiĝis
rapide. Ĉu pro
griza ĉiel' tuttaga
jam nestiĝis birdaro?
Frostas branĉaro.

Malvarmas
ĝisoste aer'.
Ekneĝas sur montaro.
Mallonge dancis neĝer'.
Pretas malaper'.

Ŝanĝiĝas
ĉi vintra veter',
De varmo al malvarmo.
Frostiĝas jam seka ter',
eĉ glaciĝas river'.

Sed floris
blanka galanto.
Tremis blankaj kapetoj,
spite al ventokanto.
Fi muzikanto.

Kaŝis sin
en kavoj bestar',
iuj pretas ekdormi.
Iuj flugas sur kampar',
Sur ĉiel' nubar'.



**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Laimundas Abromas (Litovio)



Pro kio mi stultas?

Jam delonge miras mi pri mia stulteco kaj malsaĝeco. Mi decidis solvi tiun ĉi problemon kune kun mia najbaro ĉe la bokaloj da biero.

—Do, pro kio mi tiom malsaĝas? — mi demandis mian najbaron.

—Povas esti, ke via gena kombinaĵo estas maltaŭga, aŭ estis malfacila via infaneco, eble vi falis iam de sur la arbo? — provis klarigi la aferon mia najbaro.

—Nu ne, mi ne memoras, ke mi iam falis de sur la arbo, nek de sur lito, des pli de sur la tegmento, kaj miaj genoj estas bonegaj... — pruvigis mi.

—Sed pro kio vi decidis, ke vi estas malsaĝa? Al mi ŝajnas, ke vi estas tute normala homo, — atente observante min, najbaro glutis bieron.

—Nu, tiel ŝajnas al mi..., vi sciuj, kiaj bonegaj ideoj nestas en mia kapo, sed kiel malsaĝe ĉio finiĝas. Eble tiam vi komprenus? — mi provis konigi la aferon al mia najbaro.

—Ekzemple? — scivole ekinteresiĝis najbaro.

—Pasintjare mi studis Esperanton, sukcese finis lingvokurson kaj forlasis ĝin. Mi ne plu vizitas klubajn kunvenojn, ne plu partoprenas en esperantistaj renkontiĝoj. Eblecoj estis grandegaj: multaj geamikoj enlande kaj eksterlande, vojaĝoj tra la mondo. Kaj ĉio — for!...Ĉu tio ne estas malsaĝe? — rakontis mi al mia najbaro.

—Sed kiom da mono vi estus perdinta pro tiu Esperanto! Vi estus forveturinta eksterlanden, devojĝinta kaj ne reveninta hejmen! Kaj nun, kiom da mono vi ŝparis, kiom da biero vi trinkos! Tie ĉi vi bonege decidis! — laŭdis najbaro min.

—Kaj jen, sabate matene mi ekpensis, ke mi devas malgrasiĝi, forĵeti dek kilogramojn da korpa pezo... Tamen por tagmanĝo mi manĝis grandan teleron da barĉa supo kun multaj frititaj terpomoj kaj ankoraŭ du grandajn bifstekojn. Nu, ĉu mi ne stultas? — prezentis mi plian fakton al najbaro.

—Via penso estis tre bona, nur la realigo

malĝustis, sed mi ne diru, ke ĝi estis malsaĝa. Multaj homoj tiel farus, ricevintaj bonguste manĝi, — trankviligis min najbaro.

—Do, hieraŭ mi diris: ĉio, mi ne plu trinkos tiun bieron, pro ĝi mi fariĝis dikventra. Kaj jen, hodiaŭ mi sidas kun vi kaj ree trinkas la bieron, — plendis mi.

—Nu, jes. Kio koncernas bieron, vi malsaĝe pripensis. Tamen vi tutegale revenis al saĝo! — ni ektintigis bokalojn kaj glutis bieron.

—En mia kapo naskiĝas bonegaj ideoj, kiujn mi volas plenumi. Tamen iu interna stultulo ĉion difektigas... Pro tio mi tre suferas, ĉar mi komprenas, pro kio tiel okazas... — mi plendis al mia najbaro.

—Dominiko, vi estas artisto. Komence vi tro multe revadas, sed poste —tro multe improvizas. Pro tio tiel estiĝas, kiel estiĝas, — trankviligis min najbaro.

—Pro kio mi ne konsekvenas? Mi nenion sukcesas fini ĝis la fino... Mi promesas, ĵuras, entuziasme komencas ... sed poste mi mem min perfidas kaj ĉion faskigas, —denove plendis mi.

—Eble mankas al vi la volo, obstino, decidemo? —cerbumis mia najbaro.

—Mankas al mi la prudento, —malĝoje konfesis mi. Sed najbaro tuj provis korekti situacion.

— Kaj eble mankas grava kaŭzo, aŭ argumento, motivo?

—Ne. Nome — konstante, efektive funkcia cerbo, jen kio mankas, — decidis mi.

—Tamen, Dominiko, amiko mia, neniu malsaĝulo mem konfesos, ke li estas stulta. Ĉiokaze en vi estas io ne normale... Eble vi estas tro konscienca? — scivolis najbaro.

—Jes, verŝajne... bone vi diras... Mi estas konscienca malsaĝulo! — finfine konstatis mi.

Najbaro rigardis min, kvazaŭ unuan fojon ekvidinte. Li glutis iom da biero kaj milde, per konsola voĉo, diris :

—Konscienca homo ne povas esti malsaĝa. Trankviliĝu Dominiko. En vi ĉio bonas. Estu vi tiel plu konscienca, kaj ĉu vi estas saĝa aŭ malsaĝa — decidu aliaj.


—Mi komprenas. Mia konscienco igas min malsaĝumi. Se ĝi estus pli trankvila, kvietaj, mi vidus

min multe pli saĝan, — decidis mi.

—Bravo! Nome! — ekĝojis najbaro, finfine aŭdinte saĝan klarigon.

Ni ektintis per bokaloj kaj satrinkis bieron.

Rita Mkrtĉjan (Amenio)



Artistino, florbukedo kaj... Esperanto-lecionoj

Estis fora tempo, kiam mi instruis bazan kurson de Esperanto.

Post lecionoj ni ofte ekskursis en la urbo, ripetis laŭvoje la frazojn, vortojn, nomojn de diversaj objektoj Esperantlingve.

La lernantoj, (ni ĉiuj estis preskaŭ samaĝaj) proponis trinki kafon en unu el kafejoj.

Mi ege ŝatas florojn, (kiel ĉiuj virinoj), kaj en tiu tago en miaj manoj estis luksa florbukedo — donaco de unu el lernantoj.

Ni alproksimiĝis al kafejo, kiu troviĝis en belega ĝardeno kaj eksidis, ĝis niaj junuloj foriris aĉeti la kafon.

Ni babilis Esperante kaj kaptis surprizplenajn rigardojn de "najbaroj". Post unu minuto unu el niaj knabinoj turnis la kapon dekstren kaj restis senmove. Poste la dua, kaj mi, laŭvice, ankaŭ eksilentis, kiam ekvidis lin — nian faman amatan aktoron — Aŝot Adamjan.

Talenta juna aktoro sidis tiel proksime, ĉe apuda tablo kaj trinkis kafon kun sia amiko.

Tute neatendite por mi mem, mi etendis manon kaj donis al li florbukedon. Estis simpla signo de dankema spektanto.

Li ridetis, kore dankis kaj demandis, per kiu lingvo ni interparolas.

Per kelkaj frazoj ni rakontis al ili pri Esperanto.

Poste ni trinkis la kafon kaj rimarkis, ke ili ankaŭ finis trinkadon, sed li ion faradis kun nia bukedo.

Ni preskaŭ ŝtoniĝis, kiam ekvidis en liaj manoj kvar etaj florbukedoj (faritaj el unu). Li kun bondeziroj transdonis al ĉiu el ni, po unu.

— Ĝis revido, diris li, — Dankon al vi.

Ni, knabinoj, nur memoras, ke respondis kaj dankis Esperantlingve, aŭ pro ekmiro, aŭ pro lia ĝentila ago.

Sed li ĉion komprenis, ĉar denove ridetis per sia belega rideto, kiun ni memoras el konataj filmoj.

Li certe eĉ ne ekmemoros ĉitium etan epizodon de la vivo, sed mi memoras pri tio, ke multaj dankemaj spektantoj donacis al li florojn, sed malmultaj ricevis florojn de la artisto.

Vere nia vivo konsistas el la rememoroj, kiujn iam ni ekdeziros rakonti.




Intervjuo kun Dimitrinka Kateva Predizanto de EDK “D-ro Ivan Kirĉev” Razgrad, Bulgario

S-ino Dimitrinka Kateva estas bela virino, instruistino laŭ profesio kaj esperantistino. Ŝi estas virino kun intelektaj interesoj, kun forta spirito, ĉar ŝi laboras kun infanoj kaj havas multe da geamikoj. Tiaj homoj neniam maljuniĝas spirite.—

—*S-ino Kateva, mi petas, prezentu vin! De kiam vi iĝis esperantistino? Kiuj estis viaj instruistoj?*

—Mi ŝatas lerni fremdajn lingvojn. Mi lernis en gimnazio “Maksim Gorkij” en urbo Ruse kun instruado ruslingve. Poste mi studis rusan filologion en Universitato en urbo Veliko Tarnovo. De 1978 jaro ĝis mia emeritiĝo en 2012 mi instruis rusan



lingvon en meza lernejo, poste en Humanisma kaj Matematika gimnazioj en urbo Razgrad. Mi komencis lerni Esperanton aŭtodidakte estinte studentino. Tamen seriozan lernadon kun instruisto mi komencis en 1990 jaro. Mi estas feliĉa, ke mia instruisto estis s-ro Nikola Uzunov – bonega fama bulgara esperantisto, instruisto, tradukisto. Li instruis al mi en la Internacia Esperanta kursejo Pisanica apud urbo Smoljan. Mi mem instruis Esperanton al multaj miaj

gelernantoj, kiuj, bedaŭrinde, jam ne loĝas en Razgrad, pro tio ke ili laboras en grandaj urboj: Varna, Sofio, Plovdiv ktp.

Ekde 2011 s-ino Kateva estas prezidanto de la Esperantista Domo pri Kulturo “D-ro Ivan Kirĉev” (EDK) en urbo Razgrad, en kiu oni okazigas regulan interesan agadon.

—*Mi petas, rakontu pri via sperto en EDK!*

—Nia Esperantista Domo estas fondita en la jaro 1984, ĝia fondinto estas, tre estimata en nia urbo Razgrad, doktoro Ivan Kirĉev, fama bonega esperantisto kaj esperanta instruisto. Li kaj sekretariino (de 1990) Ivaniĉka Maĝarova organizis interesajn esperantajn eventojn: konkursojn, festojn, konferencojn, kvizojn, renkontiĝojn ktp. Mi tuj estiĝis aktiva partoprenanto en ĉiuj aranĝoj kaj kunlaboranto.

En la jaro 1993 nia EDK organizis kaj okazigis altnivele la 43-an Kongreson de BEA. Nia tradicia festo EKRA (Esperantista Krea Renkontiĝo “Abritus”) okazis unufoje en la jaro 1990 kaj ni okazigas ĝin ĉiujare senĉese eĉ dum la monda pandemio pro COVID-19.

Multaj famaj esperantistoj partoprenis la Internacian konkurson pri poezio kaj humuro: Valentin Melnikov, Carmel Mallia, Perla Martinelli, Lode Van de Velde, Nikolaj Neĉaev, Evgenij Georgiev el Kazahio, Cyril Vergnaud el Taivano, Joel Muhire kaj Honore Sebuĥoro el Afriko ktp.



Dum Balkana esperantista renkontiĝo, 2016j.

D. Kateva donacas florojn kaj modestan donacon al s-ro N. Uzunov

En la jaro 1999 ni organizis Internacian Danuban Renkontiĝon, kiun vizitis multaj eksterlandaj esperantistoj.

En la jaro 2016 denove okazis Internacia Balkana Esperantista renkontiĝo kun karaj gastoj: Josip Pleadin el Kroatio, Johan kaj Svetlana Derks,

Nebojsa Stankovič el Serbio, Marian Vochin el Rumanio, fama hungara esperantistino Ana Bartek, kiu kelkfoje gastis en Razgrad. Dum la renkontiĝo okazis konferenco je temo “La disvolvo kaj pureco de la internacia lingvo”. La gravan prelegon pri la neologismoj en Esperanto faris Nikola Uzunov, prelegis ankaŭ s-ro Josip Pleadin, s-ro Georgi Mihalkov kaj s-ino Eva Bojaĝieva.



Sinjoroj: G. Mihalkov, Josip Pleadin kaj Venelin Mitev – EKRA-2016

Ana Bartek, nia amikino Anjo Amika kantis belegajn kantojn. Mi povus ankoraŭ multe rakonti pri la interesaj renkontiĝoj kun talentaj poetoj, verkistoj, artistoj ktp., pri la kvizoj organizitaj okaze de la esperantaj jubileoj (en 2007 kvizo okaze de 120-a jubileo de Esperanto kun esperantistoj el Ruse kaj Polski Trambeŝ), pri la interesaj libroj, kiujn eldonis EDK, pri nia modesta jara revueto “Esperantista tribunano”, kiun ni senĉese eldonas kaj kiun ricevas rete kaj papere multaj eksterlandaj esperantistoj.



Kantas Anjo Amika – kara nia gastino

EKRA- 2016

—S-ino Kateva, Sukcese finis 2022 j. Kiaj estas la planoj de EDK dum 2023?

Rakontu, mi petas, ankaŭ pri la Internacia

Literatura Konkurso, ĉu denove iĝos?

Kompreneble, nia plej grava aranĝo dum 2023 jaro tradicie estos nia festo EKRA, dum kiu ni anoncos la rezultojn de la Internacia konkurso pri originala esperanta poezio kaj humuro kaj de la Nacia

konkurso pri traduko el bulgara en esperanton. La 26an de Julio ni denove festos la mondan Tagon de Esperanto. La 01an de oktobro- monda tago de poezio kaj muziko tradicie ni okazigas poezian vesperon, dediĉitan al fama bulgara verkisto – jubileulo. Kompreneble en decembro ni organizas kaj okazigas Zamenhofajn tagojn. Post la fino de la jaro ni preparas kaj eldonas nian jaran modestan revueton “Esperantista tribunano”

Fine mi deziras sanon, bonfarton, esperantan aktivecon, sukcesojn kaj prosperon, amon kaj feliĉon al la legantoj de la belega riĉenhava revuo “Pensejo” dum 2023 jaro!

Mi kore dankas al vi pri la respondoj! Sukcesan laboron dun 2023 jaro!

Elena Popova el Bulgario

Estimataj gesamideznoj!

SEDK “D-ro Ivan Kirĉev”- urbo Razgrad, Bulgario lanĉas por 34a fojo Internacian Esperantan konkurson por originala esperanta poezio kaj humuro – EKRA-23. La sendotaj konkursaĵoj je liberaj temoj nenie devas esti publikigitaj antaŭe. Ili devas esti subskribitaj per pseŭdonimoj. La konkursaĵojn, bonvolu vi sendu al retadresoj: edkrazgrad@gmail.com; dimakateva@gmail.bg. La veran nomon kaj poŝtadreson, karaj partoprenontoj, vi sendu al dkateva@mail.bg kaj ekra_razgrad@mail.bg Limdato – 05.06.2023. La rezultoj estos anoncitaj kadre de EKRA-2023, kiu okazos la trian sabaton de junio 2023. La premiitaj konkursaĵoj estos publikigitaj en mondaj esperantaj revuoj kaj en “Esperantista tribunano” – eldonaĵo de la Esperantista Domo pri kulturo “D-ro Ivan Kirĉev”– Razgrad.

Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Retadreso: vejdo@163.com

www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm